



# LA JUNA VIVO

OFICIALA MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

Redakcio kaj Administracio: TJO-Centro, West-Graafthijk (NH), Nederlando  
Gironumero 382363

Jarabono 3 guld. aŭ egalvaloro

## AŬTUNA TEMPO — PROPAGANDA TEMPO.

Ja estas konata afero, ke la komercistoj, kiam ili volas vendi iun produkton, diversmaniere konigas ĝin al la klientoj. Se ili ne farus tion, oni ne aĉetus la produkton, ĉar neniu prudenta homo havigas al si ion, kio ne estas konata en vasta rondo aŭ montrisian praktikan valoron. Artiklon nekonatan oni ne fidus kaj bona komercisto do regule anoncas pri siaj varoj.

Se la Esperantistoj ne daŭre propagandus, ĉiujare denove, oni pensus, ke Esperanto malprogresas, kaj oni perdus sian interesiĝon, dum kontraŭstarantoj triumfe krius, ke Esperanto ne taŭgas, ĉar oni ja neniam plu aŭdas pri ĝi.

Sekve oni regule aperigas artikolojn en naciaj gazetoj kaj disdonas propagandajn flugfoliojn k.t.p. por montri al la homaro, ke Esperanto estas lingvo praktike uzebla kaj aplikata en ĉiaj medioj.

La ĉisupraj ekzemploj rilatas ankaŭ al T.J.O. Nia unuiĝo estas nur malmulte konata en junularaj rondoj kaj eĉ inter la Esperantistoj estas ankoraŭ multaj gejunuloj, kiuj nur suprajje aŭ tute ne scias pri la ekzisto de internacia junularorganizo. Jen do la labor-kampo duspeca, kiun ni prilaboru:

- a. Konigi aŭ/kaj interesi la junajn Esperantistojn pri T.J.O.
- b. Aranĝi kursojn por gejunuloj neesperantistaj kaj anigi ilin al la internacia movado.

Koncerne la unuajn la afero estas sufiĉe simpla: en multaj urboj aŭ vilaĝoj ekzistas loka sekcio de landa Esperanto-unuiĝo. Prelegu en kunveno pri T.J.O., pri ĝia utilo por la junularo (internacia kontakto, korespondado kaj rezulte reciproka estimo). Varbu subtenantojn kaj poste aparte parolu kun la ĉeestantoj junaj.

Ĉu vi korespondas? Kompreneble, vi diros. Ankaŭ inter viaj eksterlandaj korespondantoj ofte estas ne-TJO-anoj! Sendu al ili de

temp' al tempo kelkajn numerojn de „La Juna Vivo” kaj uzu T.J.O.-korespondmaterialon.

Por la dua kategorio oni bezonas iom pli da energio kaj sperto: Ĉiu T.J.O.-ano tamen en kunlaboro kun samlokaj T.J.O.-anoj aŭ, se tiuj ne jam estas, sola klopodu organizi kurson dum la venonta vintro. Oni antaŭe propagandu en lernejoj per prelegoj aŭ ariŝoj, plue en junulaj kluboj k.t.p. kaj inter geamikoj. Ne tuj seniluziiĝu, se venas nur malmultaj por partopreni la kurson. Se vi sukcesos instrui kaj teni ilin en la kurso, vi havos ja pli da helpo la venontan jaron!

Tamen ne nur instruu, faru ankaŭ promenadojn, studu kantojn, teatraĵetojn aŭ popoldancojn kaj klopodu ardaĵi iom da „sankta fajro”.

Formu do klubon, T.J.O.-sekcion!

Por ĉi tiu entrepreno mi tamen havas laŭspertan konsilon: Bone konsci, kiujn personojn vi aligas al la kurso. Ne nur pensu: „ju pli da partoprenantoj, des pli bone.” Poste vi rimarkus, ke vi eraris. Personoj, kiuj ne havas sufiĉe da intereso aŭ ne estas seriozaj, povas grave influi la sferon de la ĵus fondita sekcio! Kaj post certa tempo ili nepre ekŝigos!

Kaj fine, geamikoj, raportu pri viaj agoj, sukcesoj kaj ..... seniluziiĝoj al via ĉefperanto.

T. K.

## **EKSKURSO AL LA MONTARO (Daŭrigo).**

Ĝis la rando de la muro ankoraŭ nur povis esti dudek metroj, ne pli.

La aero inter la nuboj estis tre malvarma kaj Miĉo estis nudpieda.

Mi diris tion al li, sed li ne volis aŭskulti min. La situacio postulis la tutan homon.

Baldaŭ ni ekvidis la randon kaj la vento, kiu plifortigis, montris al ni, ke la supro jam estas proksima.

Finfine restis antaŭ ni nur kelkaj mallargaj, krutaj rokbretoj.

Ili estis malsekaj kaj parte kovritaj de neĝo. Ni ĉirkaŭrigardis — sed alia elirejo ne ekzistis. Tia danĝero, ok metrojn antaŭ la fino!

„Se iu falus de ĉi tie,” diris Miĉo, „oni ne trovus lin sube.”

Mi silentis. Ja estis sence diskuti pri tio.

Li paŝis antaŭe. Inter la rokbretoj fluis la akvo, faranta malgrandajn akvofalojn. Kaj ili ankoraŭ pli malsekigis nin.

La unuan breton ni feliĉe transiris. Miĉo jam transiris la duan. Mi iom ekglitis, sed feliĉe per la mano atingis la roketon kaj savis min. Nur dum parto de momento mi haltis, ripozante ..... kaj ekaŭdis la glitadon samtempe kun krio .....

Miĉo, kiu ĵus atingis la randon de la tria breto, ekglitis al mi sur la neĝo, ĉiam pli rapide kaj en momento senvorte pasis min.

Mi fermis la okulojn, sed en la sama momento, pripensante kio ĵus okazis, mi aŭdis mallaŭtajn voĉojn en la proksimo .....

Miĉo havis „feliĉon”, eble la plej grandan bonŝancon en sia tuta vivo: Li hazarde sukcesis haltigi sin sur la rando de la unua rokbreto — sur la rando de senfunda abismo .....

Post kelkaj minutoj mi mem provis grimpi returne, sed tute sensukcese: estis tro danĝere por mi kaj ankaŭ por Miĉo. Li, kvankam ne vundita, ne povis ankoraŭfoje transiri rokbreton, kiu estis senigita de neĝo kaj do pli danĝera.

Ni ambaŭ sciis, ke kamaradoj, kiuj iris laŭ turista vojo, certe atingis la pinton de Triglav kaj tial Miĉo proponis, ke mi voku ilin.

Mi surgrimpis la randon, kiu estis nur tri metrojn pli supre. Do, post kvin horoj da grimpadado mi staris sur forta fundo.

La ĉielo estis pli hela kaj la nebuloj ĉirkaŭ mi malpli densaj. Ie supre, ŝajnis al mi, estis la suno. Vento blovis, ĵetante al mi gutojn de pluvo. Mi ekkriis, sed la vento blovadis en malsama direkto ol kie devus esti niaj amikoj. Tamen mi kriadis, vokante ilin. Forte mi kriis, nesciante ke miaj krioj perdiĝis en la vento.

Se mi sciis, kie ni estas, mi povus iri al la kabano sur la altebenaĵo, kiu povas esti nur duonhoron de tie. Sed mi ne konis la ĉirkaŭaĵon kaj ankaŭ ne povis lasi Miĉon sube sur la breto.

Pripensante kion fari, mi ekaŭdis fortan krion tute proksime de mi. Mi ekkriis pro ĝojo kaj baldaŭ klare aŭdis paŝojn sur la rokoj. Du siluetoj alvenadis el la griza nebulo. Ĉiam pli klare mi vidis ilin .....

Tiu grupo jam antaŭ unu kaj duona horo atingis la supron kaj poste ili ekzorgis pri ni. Ili foriris por serĉi nin, pensante ke ni estas ankoraŭ ie meze de la muro, povante iri nek antaŭen, nek returne.

Post duonhoro ni jam sidis en varmeta ĉambro de kabano, trinkante teon, ĝojante. La suferon ni baldaŭ forgesis.

Posttagmeze la nebulo ĉirkaŭ la kabano ankoraŭ pli maldensiĝis kaj ni tuj decidis iri sur la supron de Triglav. Ĉu eble tie estos la suno? Jes, la pinto estis en la suno, en pura, freŝa aero kun la blua kupolo de la ĉielo super ni. La pinto estis nur insulo en vasta nebula maro. Ĉie ĉirkaŭ ni nur nebulo, tute simila al la marnivelo.

Ie malproksime ni ekvidis montojn — En Aŭstrujo ili estas. Kaj tie ankaŭ la italaj Alpoj estis videblaj: helaj en la suna brilo kaj en la neĝa blankeco. Majesta ĉirkaŭrigardo, belega. Oni ne povas priskribi ĝin. Oni ne povus trovi indajn vortojn. Jes, la naturo bone kompensis nian suferon!

\*\*  
\*

Kiam ni reiris hejmen, dimanĉespere, ni renkontis amikojn en la nokta tramo. Ni estis ĝojaj kaj kontentaj, sed ĉu eble tio ne estis videbla sur niaj lacaĵ vizaĝoj?

Ili restis dimanĉe en la urba nebulo kaj iris danci. Nun ili estas neĝojaj kaj parolas al ni:

„Kial vi ĉiam iras en tiun diablan rokaron, nun, en la malseka vetero tie riski la vivon, kiu estas tiom mallonga kaj kara! Ĝoju kun ni!”

Ne ĉiuj homoj scias, ke sur la altaj pintoj ĉiam brilas la suno, sed kion ni

respondu al ili? Ĉu estas necese respondi? Mi ne respondis al tiaj demandoj. Estas malfacile paroli pri tio kaj ŝajnas al mi, ke ili ne bone komprenus min.

Ĉiu, kiu unuafoje iras al la montaro, baldaŭ iros ankaŭ la duan fojon. Li baldaŭ fariĝos „malsana”, se li ne povas iri en la rokaron. En la montaro la homo estas proksime al la naturo, al la ĉasta naturo. — Ĝi estas bela, forta, sovaĝa, sed justa.

Nur tiu, kiu ofte iras en tian ĉastan naturon kaj ofte vivas en danĝero, kapablas konsideri la valoron de la vivo. Efektive ĝi estas mallonga, sed ni devas trapasi ĝin tiel, ke poste ni ne pentos pri senutile travivitaj jaroj.

K. Drago, Ljubljana, Jugoslavujo.

### Silentemaj Skotoj.

Vojaĝanto, kiu de sia amiko aŭdis pri la parolŝparemo de la skotoj, dum vizito al skota vilaĝo deziris mem certiĝi pri tiu afero.

Kiam li estis sur tombejo, li diris al la gardisto:

„Oni staras ĉi tie tute trankvile, ĉu ne?”

„Pli trankvile sub la tero”, respondis la viro.

La vojaĝanto ne perdis la kuraĝon kaj faris aliajn demandojn. Sed ĉiam li ricevis respondojn unusilabajn aŭ el du, tri vortoj. Fine, tre certa, ke li havis bonan demandon por komenci longan paroladon, li demandis: „Ĉu vi, sinjoro, vivis ĉi tie la tutan vivon?”

„Ankoraŭ ne”, estis la respondo.

El „English Digest” trad. C. Crovetto, Genova, Italujo.

### Du inteligentaj papagoj.

Estis maljuna fraŭlino, kiu posedis inteligentan papagon.

Sed ŝi havis ankaŭ du nevojn, kiuj instruis al ĝi multajn malbonajn frazojn.

Kiam ĝi vidis la mastrinon, ĝi diris: „La diablo prenu vin!”

Tio ĉagrenis ŝin tiom, ke ŝi portis la papagon al sia amikino, kiu ankaŭ posedis papagon. Sed tiu estis tre ĝentila kaj bonkondata birdo, kiu parolis nur bonajn vortojn. La fraŭlino esperis, ke ŝia papago lernos tiujn kaj forgesos la malbelajn frazojn.

Post du monatoj ŝi iris por repreni la birdon al sia hejmo.

Kiam la du papagoj vidis ŝin, la malbona kriis: „La diablo prenu vin!”

Kaj: „Dio aŭdu nian preĝon”, diris la alia.

Herta Kraus, lernanto de G. B. Tordoff en la Teknika Kolegio, Bath, Anglujo.

**Junularo, skribu por via propra gazeto!!!**

# GAJA KANTO.

1 = C 3/4

Cifernotoj.

5 . 1	5 . 3	4 . 2	3 . 1	5 1 3	2 7 5	1 6 4
En prin-	tem-po	dum ma-	te- no	va- ge	kan- tis	bel- kna-
Es- tis	ju-na	kaj sen	ĝe- no	ti- a	ĉar- ma	ŝaf- es-
1) C		G <sup>7</sup>	C		G	D <sup>7</sup>

5 . .	1 . 5	5 . 5	6 . 6	6 . .	7 7	7 6 7	1 . .	1 . .
bin'	Zu-la	la la	la la	la	Zu la	la -- la	la ----	-----
trin'								
G	C		F		G <sup>7</sup>		C	

1 . 5	5 . 5	6 . 6	6 . .	7 . 7	7 6 7	1 . .
Zu la	la la	la la	la	Zu la	la -- la	la
C		F		G <sup>7</sup>		C

En printempo dum mateno  
vage kantis bel' knabin';  
estis juna kaj sen ĝeno  
tia ĉarma ŝafestrin'.

Du ŝafidojn por kisetoj,  
jen promesis juna vir'.  
Ŝi rigardis kun rideto;  
restis vana la dezir'.

Dua vir' promesis rozojn;  
koron eĉ alia vir'.  
Ŝi rifuzis tiajn donojn,  
ĉar ne estis laŭ sopir'.

Sed la kvara, pli urĝante,  
verve ĉirkaŭbrakis ŝin,  
ŝin karesis ridetante  
kaj ardiĝis la knabin'.

Germana kanteto, ricevita de G. Milanowski (Bremen).

## Klarigo pri la ciferaĵoj muziknotoj.

La melodio de ĉi-supra kanteto estas indikita per ciferoj. Por tiuj, kiuj ne (tuj) komprenas ĉi tiun sistemon, jena klarigo:

En multaj landoj oni donas al la ŝtupoj de ton-skalo la nomojn **do re mi fa sol la si**. — En landoj, kie oni parolas angle, oni kantas **so anstataŭ sol kaj ti anstataŭ si**.

Sur la kontinento de Eŭropo (ĉu nur en la okcidentaj landoj?) oni **skribe** indikas la sep ŝtupojn per ciferoj, en landoj, kie oni parolas la anglan lingvon, per la komencliteroj de la nomoj. — Oni **kantas**: do re mi fa sol(so) la si(ti). — Oni **skribas**: 1 2 3 4 5 6 7, aŭ litere: d r m f s l t.

1) Basliteroj por gitaro, kordiono, ktp.

Super ĉi-supra kanto estas la indiko: 1 = C. Tiel oni facile trovas per klavara instrumento la aliajn ŝtupojn: 2 = D, 3 = E k.t.p. La tonojn de la pli alta oktavo oni indikas per ciferoj supersignitaj per punkto (1̇, 2̇ k.t.p.). La tonojn de la malpli alta oktavo per ciferoj subsignitaj per punkto (1, 2 k.t.p.).

La streko tra la cifero 4 egalas dieson. Oni kantas tiam ne **fa**, sed **fi**. En ĉi tiu skalo  $\sharp = \text{Fis}$ .

La supra kanteto estas tri-pulsa: estas ja tri pulsoj en unu takto.

La punkto(j) **post** cifero signifas, ke la indikita tono daŭru ankaŭ la duan (kaj eventuale la trian) pulso(j)n.

Silenton oni indikas per nulo. Tio ne okazas en ĉi tiu kanto.

La litera aŭ solfaa sistemo multe similas la ciferan. Pluajn informojn donas „Muzika Terminaro” de M. C. Butler kaj F. Merrick, havebla ĉe TJO-Libro-servo, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned. Prezo: 0,60 guld.

S. S. de Jong Dzn.

## ORGANIZAJ INFORMOJ.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned.*).

Ankaŭ en Francujo, kie s-ro Bizet ne plu havas la okazon labori por T.J.O., ni havas novan ĉefperanton: s-ro Daniel Luez, Lycée, LAON, (Aisne). Poŝtĉekkonto: Paris, 312255.

Denove aperis „La Peranto inter la Perantoj”. Ĝi estas sendita al ĉiuj funkciuloj. Interesatoj povas peti senpagan ekzempleron ĉe la sekretariejo.

Ĉar la organiza jaro daŭras de la 1-a de septembro ĝis la 31-a de aŭgusto, ni petas al novaliĝintoj, kiuj deziras aboni la gazeton en la kuranta monato, pagi **ĝis septembro**. Se iu aliĝas en decembro, li pagu por 7 n-roj, do 2,10 guld.

En sia lasta kunsido la estraro i.a. decidis: **a.** La nederlandaj anoj de la internacia estraro transprenis la gvidadon de la nederlanda sekcio.

**b.** La 8-a Internacia Junular-Kunveno okazos en RY, Danujo. Detaloj en venonta n-ro.

## RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

„La Nekonatino”, de R. C. Muschler, el la germana lingvo tradukita de L. Goppel; eld. de Limburger Vereinsdruckerei, Limburg, Germanujo.

Tre delikata novelo, de kiu jam aperis tradukoj en 8 lingvoj.

La ĉefpersono, Madeleine Lavin, 21-jara elprovinca knabino, post la morto de sia severa onklino ne plu havas parencojn kaj intencas realigi sian kordeziron iri al Parizo por fondi tie modmagazenon. Antaŭe ŝi vizitas Marsejlon kaj tie pro hazardo interkonatiĝas kun lordo Thomas Vernon Bentinck, diplomato. Li akompanis tien sian fianĉinon, kiu ŝipe forveturas al siaj gepatroj en Egiptujo por tie serĉi taŭgan domon por si kaj Bentinck. Post iom da hezito Madeleine akceptas la proponon de Bentinck kune vojaĝi al Parizo per lia aŭtomobilo. Inter ili estiĝas amo, tamen ambaŭ regas sin. Li, ĉar li volas resti fidela al sia fianĉino, ŝi, ĉar ŝi komprenas, ke la alia virino pose-

das lian promeson. Sub rideto ŝi kuraĝe kaŝas sian ĉagrenon kaj ĝuas la mal-  
longan tempon kun la amiko. Tamen post lia foriro ŝi ne plu povas elteni  
la vivon. Ŝajnas al ŝi kvazaŭ la akvo de Sejno flustras al ŝi liajn vortojn kaj  
ebria pro laceco kaj sopiro ŝi eniras ĝin, renkonten al la amato .....

„Ŝia vizaĝo, glorigita, ridetis, kiam oni trovis ŝin .....” — Per tiuj  
vortoj finiĝas la 66-paĝa, ankaŭ ekstere bone prizorgita, libreto. La lingvo  
estas bona, preseraroj maloftaj. Mallonge: rekomendinda verketo. Prezo:  
bind. 3 Gmk (2,60 guld.), broŝ. 2 Gmk. (1,75 guld.). La libreto estas men-  
debla ĉe la TJO-Libro-Servo.

**Iom pri Stokholmo**, bele ilustrita gvidlibreto, 40-p., pri la ĉefurbo de Sve-  
dujo, eld. de S.A.T. (67 Av. Gambetta, Paris 20, Francujo) okaze de la 24-a  
SAT-Kongreso, kun financa helpo de Sveda Laborista Esp. Asocio. La libreto  
donas utilajn kaj interesajn informojn pri gravaj publikaj konstruaĵoj, pri  
sociaj, kulturaj kaj ekonomiaj temoj. Prezo 2 sv.kr. La lingvo estas bona.

**Esperantisto Slovaka** (n-ro 11-12'50) prezentas al ni interesan priskribon  
pri la estiĝo de t.n. karstaj fenomenoj. „Vizito en la ŝtoniĝinta mondo” estas  
la titolo de la artikolo, verkita de d-ro L. Izák. 77 belaj fotoj ornamas ĝin.  
Adr.: Martin, Slovakotour, Ĉeĥoslovakujo.

**München salutas vin.** Bela gvidlibro pri la urbo München, kun multaj belaj  
fotoj. Eld. Verkehrsverein München e. V., Sonnenstr. 24, Germanujo.

**Esperanto Leerboekje** voor de lagere school en voor hen, die geen ander  
dan lager onderwijs hebben genoten, 1-a parto, de H. A. Appel; nur por  
nederlandanoj; prezo 1,50 guld. Recenzo sekvos.

P. Benneman: Mirŭ, Pensu, Ridu, (originala) .....	5,40 guld.
Alexis Kivi: La Botistoj (el la finna) .....	0,65 „
Linnankoski: Batalo pri la domo Heikkilä (el la finna) ...	0,45 „
Burĝonoj, Fotoj kun poemoj (el la finna) .....	8,65 „
Angel Karalijĉev: La Ponto (el la bulgara) .....	0,15 „
Zamenhof: Kongresaj Paroladoj (2 vol.) .....	po 0,35 „
Kantaro „La Juna Vivo” .....	0,75 „
Kantaro „Ni Kantu” .....	1,00 „
T.J.O.-poŝtkartoj .....	po 0,01 „
Schidlof-vortaro Esp.-Ned., Ned.-Esp. ....	2,25 „
Zondervan: Vortoj kaj Esprimoj (por nederlandanoj) .....	1,15 „
D-ro Manders: Vijf Kunsttalen .....	7,50 „
Benink: Beknopt Esperanto-Leerboek .....	1,55 „
Ĥinsignoj (kun ŝraŭbeto) .....	0,75 „

Ĉi tiujn kaj aliajn esperantaĵojn liveras la TJO-Libro-Servo, Hof  
v. Delftlaan 79, Delft, Ned., ĝironumero 570720.

**La dua vintra renkontiĝo** sub la gvidado de G.E.E. okazos de la 23-a de  
dec. '51 ĝis la 2-a de jan. '52 en Fontcouverte apud Saint-Jean-de-Maurienne,  
Savoie (Francaj Alpoj). Oni petu informojn (antaŭ la 20-a de okt.) al E.  
Bidoit, instruisto, C. C. Suippes (Marne), Francujo. Aldonu respondkuponon.

Dum la lasta tempo ICAO (Internacia Civila Aviada Organizaĵo) multe diskutis la problemojn de lingvo en la aertrafiko.

En konferenco de la Komunikada Sekcio de ICAO, en Montreal, Kanado (24/4—2/6'51) oni rekomendis al ĉiu ŝtato reprezentata en ICAO, ke oni starigu esploron pri la redaktado de aviada internacia lingvo surbaze de la angla.

Aparte grava por ni estas la jena frazo en ĝia raporto: „..... La Sekcio konsideris, ke la kreo de tute artefarita lingvo estas projekto tro akademia kaj verŝajne ne atingus bonajn rezultojn aŭ la necesan kunlaboron en plenumiĝo kiu estas esenca por la sukceso de tia klopodo.”

La Sekcio do aŭ ignoris aŭ ne konscias pri la atingoj de Esperanto. Estas dezirinde, ke ĉiu esperantisto skribu al la Sekretario de Sekcio ILA, ICAO, Montreal, atentigante pri la ekzisto kaj disvasteco de nia lingvo.

# KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Britujo:** Klaso (80 knaboj) dez. kor. kun geknaboj el ĉiuj landoj. Adreso: F. B. Hotchkin, Elliston County Secondary School, Cleethorpes, Lincs.

**Bulgarujo:** Stojĉo Nikolov Stojĉev, ul. „Ivajlo” 117, Burgas, dez. kor. k. l. t. m., interŝ. pm. kaj pk., gazetojn, fotojn, k.t.p.

F-ino Tonka Ĉakarova, (18-j.), Str. „Struma” 18, Burgas, dez. kor. k. l. t. m., interŝ. pm., il. pk., gazetojn, fotojn k.t.p.

15-20-j. gejunuloj dez. kor. pri ĉ.t., interŝ. pk., gazetojn, k.t.p. Resp. certa. Skribu al: Janĉo Petrov Janev, Ul. „Kliment Ohridski” 26, Burgas.

17-j. lernanto dez. kor. k. l. t. m. kaj interŝ. bildk. kaj gazetojn. Tonĉo Mavrur, str. Abadgiyska 1, Burgas

**Cehoslovakujo:** Jaroslav Bily, instruisto, Sverni str. 1-9, Praha 13, Sporilov, dez. kor. k. interŝ. pm., prefere k. Portugalujo, Francujo, Italujo.

**Finnlando:** Tuomo Kaukavuori (14-j. gimnaziano), Kauppila: Sendu 50 div. poŝtm., kaj mi sendos saman kvanton al vi.

**Francujo:** R. Bizet, 2 bis Rue Haigneré, Boulogne s/M (P de C), dez. interŝ. poŝtm. kun la tuta mondo.

**Germanujo:** 35-j. instruisto dez. kor., prefere pri biologiaj eksperimentoj laŭ la Miĉurina metodo. Josef Stepan, Kahla/Thur, Rudolstädter str. 1.

**Hispanujo:** José Cuadras Solé, str. Provenza 75, Barcelona, ĉefmasonisto, dez. vojaĝi al Brazilo kaj petas ĉu iu povas liveri al li laborkontrakton necesan por akiri pasporton kaj elirpermeson. Elspezoj estos pagataj.

**Italujo:** 18-jara liceano dez. kor. kun alilandaj samaĝuloj. Roberto Codazza, V. Massena 50, Torino.

**Jugoslavujo:** Kuznik Vladimir, 19-j., Esp. Soc. Ljubljana, Cankarjevo nabr. 7, dez. kor. kaj interŝanĝi bildkartojn kaj revuojn.

Junulara grupo el Zemun (apud Belgrado) serĉas korespondantojn. Skribu al Rajsic Branko, Rajaciceva 1, Zemun.

Gejunuloj el Svetozarevo deziras korespondadi. Skribu al Duŝica Gjuric, strato B. Djuriŝiĉa 8, Svetozarevo, Serbio.

Studento de literaturo dez. kor. kun gestudentoj el Norvegujo, Belgujo, Islando, Hispanujo, Aŭstrujo. Kralj Drago, Roz. dol. 6-22, Ljubljana.